


QUANCO

2-4/04

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



**Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio**
(2-4/2004)

Aperas 4-foje jare
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonoj:
+53(7)40 4484; 53 9102
Fakso: 643 8729
avanco@esperanto.co.cu

Kunordigo kaj enpaĝigo:
ALBERTO F. CALIENES

Prezo: (enlande) CUP 1.00
(eksterlande), EUR 2.00
aŭ 2 irk., pagendaj al la
UEA-konto: keax-u.
Ĉiuj rajtoj rezervitaj
Reproduktado permesata
(bv. indiki la fonton kaj
sendi du ekzemplerojn
al la Redakcio).
Interŝanĝo dezirata.

enhavo

Kongresa temo

JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO 3

Kiel prezenti Esperanton al la publiko?

ALBERTO GARCÍA FUMERO 6

Tri konkludoj por sukcesigi Esperanto-kursojn

JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO 11

Esperanto: perdita ego en la universo de Fernando Ortiz

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ 13

Kia Esperanto-movado por Ameriko?

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ 18

Kongresa Rezolucio

23

La 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto kunvenigis dum eventoplena semajno 186 gekongresanojn el 17 landoj. En la programo antaŭvidita de la organizantoj estis ses forumoj kaj rondaj tabloj dum kiuj prezentiĝis dek unu prelegoj; kunsidoj pri la agado en Ameriko kaj apartaj fakkunsidoj; ekspozicioj; paroliga kurso de Esperanto; Yumeiha sesio; ekumena diservo; aŭkcio; nacia kaj arta vesperoj; tuttaga, duontaga kaj vespera ekskursoj kaj UEA/ILEI-ekzameno, kiun sukcese finis du kandidatoj en la elementa kaj kvin en la meza niveloj.



Enkonduko al la kongresa temo

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Traleginte la rubrikon "Landaj Asocioj" de la *Jarlibro* de Universala Esperanto-Asocio por 2003, mi rimarkis ke ankoraŭ farendas multe rilate la disvastigon de Esperanto en niaj du Amerikoj, ĉar nur dek ses landoj de nia kontinento aperas tie aliĝintaj al UEA, nia tegmenta organizaĵo.

Ĝuste pro tio, mi certas ke multaj el ni favoras la temoproponon de la partoprenantoj en la 5-a Tutamerika Kongreso okazinta en Meksiko en la jaro 2001, ĉar decas ke ni entreprenu paŝojn por iel etendigi la Internacian Lingvon kaj ties noblajn idealojn tra ĉiuj landoj de nia mondoparto.

La demando kiu ĉeftemas nian Kongreson "Kia Esperanto-movado por Ameriko?", povas havi plurajn respondojn laŭ la vidpunktoj de la esperantistoj kiuj respondas ĝin sed ĉiuj respondoj nepre devas teni en konsideron, se ni estas bone informitaj, la nuntempajn celojn kaj prioritatojn de UEA fiksitaj en ties strategio, kaj la rolon kiu Esperanto povas ludi en nia regiono surbaze de niaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj kuntekstoj, kiuj varias laŭ la lando pro la fakto ke en nia regiono estas evoluantaj kaj neevoluintaj landoj, kio determinas la evoluitmon de nia agado.



La prioritatoj de UEA estas Informado, Instruado kaj Utiligo de Esperanto, projekciitaj en tri agaddirektoj: profesiigo, plijuniigo kaj tutmondiigo kun la celo daŭre disvastigi Esperanton kaj plifortigi ties internacian komunumon.

Kiel ni amerikanoj povas sukcese kombini kaj ligi la spertojn supre menciitajn por plievoluigi kaj impulsi Esperanton en nia regiono?

Estas esperantistoj kiuj diras ke ajna respondo al tiu demando ne povas preteratenti la fakton ke Esperanto estas fenomeno esence lingva kaj pro tio ĉiu kiu deziras esperantistiĝi devas bone lerni la lingvon ĉar tio estas kio diferencigas nin de aliaj movadoj kaj asocioj.

Aliaj opinias ke nia movado devas esti pli socia kaj kultura, argumentante ke ne sufiĉas bone lerni la lingvon kaj ĝui ĝin; ili emfa-



6a Tutamerika Kongreso Esperanto

21a-27a de marto 2004, Havano, Kubo

zas, ke la movado devos esti spaco por ke la membroj pliriĉigu siajn sociajn rilatojn enlandajn kaj eksterlandajn kaj pro la fakto ke Esperanto estas ponto inter kulturoj, la movadanoj povas plialtigi sian kulturalan nivelon kaj ampleksigi sian kulturalan horizonton.

Landaj asocioj bonvenigu ĉiujn novulojn, interesitojn kaj eduku ilin al tumonda konscio ene de siaj vicoj. Esperanto povas doni pli da senco kaj utilo al la vivo de la homoj.

Kelkaj esperantistoj asertas ke nia movado estu pli solidara kaj argumentas, ke la plej fortaj landaj asocioj devas helpi la malpli fortajn kaj ke ĉiuj devos helpi la unuopulojn loĝantaj en kelkaj landoj de la suda kontinento kie Esperanto ankoraŭ ne estas fakto. Laŭ ili tiu helpo konkretiĝu per sendado de materialoj, distancaj aŭ korespondaj kursoj, invitoj al eventoj, ktp.

Ne malmultaj samideanoj kredas ke nia movado devas esti pli informcela en rilato kun la unua prioritato de UEA. Ili esprimas ke ofte esperantistoj timas informi pri Esperanto en siaj medioj kaj ke ankoraŭ estas multaj homoj kiuj scias nenion pri la Internacia Lingvo kaj ties celoj kaj atingoj. Ili asertas tute prave ke informado serioza, bone planita kaj direktita sur fruktodonan grundon povas kaj povos esti tre promesplena por la estonteco de nia lingvo. Oni semu la semon de Esperanto per konstantaj kaj daŭra informado.

Oni organizu prelegojn, prezentu ekspoziciojn kaj sendu librojn, revuojn, broŝurojn kaj alispecajn materialojn al universitatoj, lernejoj kaj bibliotekoj por ke pli da homoj informiĝu pri Esperanto. Oni ankaŭ profitu la amaskomunikilojn kaj la avantaĝojn de Interreto por ke la homoj konatiĝu kun nia lingvo.

Nuntempe pluraj personoj lernas kaj rilatiĝas kun Esperanto pere de Interreto.

Analizante la historion de Esperanto en Ameriko, oni konstatas ke ĝi ekfloris en

kelkaj landoj ĉar alilandanoj loĝantaj aŭ restantaj tie dum iom da tempo disvastigis aŭ instruis ĝin; ĝuste pro tio instruado estas unu el la prioritatoj. Ni stimulu kaj spronu nian membraron bone lerni kaj studi la lingvon por ke ili pretu instrui ĝin kiam ajn bezonate digne kaj altnivele.

Ni klopodu ke niaj membroj trovu ligan inter Esperanto kaj siaj profesiaj fakoj kaj rilatiĝu kun samfakuloj de la komunumo, tiel ilia esperantisteco estos pli senca kaj utilriĉa. Ju pli esperantistoj utiligas Esperanton, des pli ĝi efikos kaj valoros kaj la argumentoj pliriĉiĝos.

Nia analizu niajn fortojn, ŝancojn, malfortojn kaj minacojn cele al la plievoluigo de nia movado. Tiu ĉi mondo, kie ankaŭ regas lingva imperiismo, bezonas Esperanton por alfronti la miskomprenojn, malegalecon, avarecon kaj malamon kiu detruas ĝin.

Ĉu ne indas, ke ni voĉdonu por movado kies membroj ne nur lernu kaj ĝuu la lingvon, sed ankaŭ laboru por ties disvastigo?

Ĉu ne indas, ke ni favoru movadon kies membroj pace batalu por ke en nia Ameriko de la Sudo oni eliminu malsaton, analfabetecon, senhejmecon, malriĉecon, tiel ke ĉiuj amerikanoj havu ŝancon dece vivi kaj feliĉe inspiri? Se iam estus tiel, pli da loĝantoj en nia regiono povus havi momenton kaj spacon por alproksimiĝi al Esperanto kaj iomete puŝi ties ĉaron kiel plejmulto el ni faras.

Ni ĉiuj cerbumu kaj konkretigu nian respondon al la demando "Kia Esperanto-movado por Ameriko?" dum la kongresa semajno kaj revenu hejmen klopodante apliki la plej bonajn sugestojn, ideojn kaj argumentojn.

Bonvolu ne atendi ke la aliaj faru por la evoluo de Esperanto en Ameriko, faru vi mem. Ameriko multe povas kontribui per siaj kulturoj, trajtoj kaj agmaniero al la sukceso de Esperanto internaciskale ene kaj ekster la komunumo. Koran dankon.

Kiel prezenti Esperanton al la publiko?

ALBERTO GARCÍA FUMERO

En la salutmesaĝo al la partoprenantoj de tiu ĉi Tutamerika Kongreso, d-ro Corsetti substrekas, ke ni esperantistoj ne bezonas defendi aŭ pravigi nin, sed fieri, ĉar Esperanto estas la plej justa solvo de la problemoj de komunikado inter malsamlingvaj kaj malsamkulturaj popoloj. Tio, kion ni rigardas okulfrapa vero, tamen ne estas tiel por multaj homoj, kaj kelkfoje pro tio kelkaj esperantistoj sindefende kaj eĉ timeme nur hobia uzas la lingvon.

El kio fontas rezisto al Esperanto? Ĉu povus esti, ke ni simple ne scias kiamaniere kompreni nin, samkiel amanto tro arda kaj sensperta fortimigas la amatinon? Eble.

Dum seminario pri informado por aktivuloj de nia asocio ni analizis la aferon kaj provis

eltrovi respondon. La plej gravaj kialoj ŝajnas esti:

1. Misinformado; 2. Timo perdi kulturen identecon; 3. Rezisto kontraŭ afero "artefarita" (la vorto "artefarita" ja elvokas ideojn pri plastaj floroj, neaŭtentajoj, kaj simile); 4. Manko da tempo por lernado (moderna vivo estas tro komplika)

Mi intence ne enlistigas tion, ke kelkfoje nia propagando ne estas alloga, ĉar miaopinie tio rilatas al la unua punkto: misinformado povas esti duflanka.

Miaopinie nur trafa kaj lerta informado povas helpi nin disfaligi la obstinajn barojn je la ceteraj punktoj. Sed, por ke ni povu trafte kaj lerte informi, ni devas esti bone informitaj. Ni ne povas prezenti aferon, pri kiu ni ne



havas klarajn ideojn. Kaj tio okazas ofte. Mi proponas al vi de nun analizi kelkajn argumentojn uzeblajn dum varbado, aŭ simpla konversacio kun najbaro.

Mi ŝatas roli kiel advokato de la diablo kaj kelkfoje petas al aktivulo: "bonvolu konvinki min pri tio, ke estas bona ideo lerni Esperanton". Poste ni analizas, rabotas, poluras la argumentojn... Faru la ekzercon!

Vi trovos, ke plurfoje **tro arda verdsteleco fortimigas homon**, kiu alikaze estus preta akcepti Esperanton. Do, neniam mienu kvazaŭ ni havus ĉiujn ŝlosilojn; ni ne asertu, ke Esperanto estas **LA** solvo, sed ke ĝi estas solvo; taŭga kaj oportuna, jes. Homoj ne amas troviĝi en senelirejo: do neniun alpremu al la muro. **Ĉiam lasu ilin eltiri proprajn konkludojn**. Se vi bone semas, vi sendube rikoltos. Enketu viajn samklubanojn: kiel ili alvenis al Esperanto? Enketu vin mem!

Elektu la argumentojn laŭ la aŭskultanto: ne por ĉiuj estus interese scii, ke la unusola maniero kiun mi trovis por konatiĝi kun la epopeo Kalevala aŭ la Ŝekspiraj sonetoj estis legi esperantan version, eble tio estos interesa por literaturamanto, sed malofte por masonisto. Al fakulo parolu pri senbara interŝanĝo kun fakuloj, al lingvisto parolu pri lingvo, al vojaĝemulo parolu pri Pasporta Servo...

Ne hontu paroli Esperanton, kiam oni telefonas vin al la laborejo. Oni ne rigardos vin strangulo se vi lerte profitas la okazon montri, ke via mondo multe pli ampleksas ol la kvar anguloj de la ĉambro. Kaj la plej grave, miaopinie: ne esperu, ke ĉiuj, kiuj simpatie skuas la kapon aŭdante vin paroli pri Esperanto kuros lerni la lingvon: **multaj el ili restos simpatiantoj**. Tio ne estas malbona per si mem, kvankam ni dezirus, kompreneble, ke ĉiuj konvinkiĝu. Se ili restas simpatiantoj, bone, **ni ja bezonas multe pli da simpatiantoj**.

Ni ne altrudu la lingvon, aŭ ni riskos enfali en la saman poton kiel tiuj simpatiantoj ne baros nian vojon, kiam ni proponos niajn projektojn aŭ oferos nian helpon al aŭtoritatoj: ne ĉiuj homoj apartenas al partioj, sed ĉiuj scias voĉdoni kaj esprimi tiel apogon al bona ideo. **Kaj ne timu, se junulo lernas la lingvon, brilas movade dum tempeto kaj poste malaperas sen spure.** Junuloj devas pangajni, serĉi por si lokon en la vivo. Enĉasu ilin kvazaŭ ili estus krimuloj! Se ni bone semis, ni rikoltos.

Mi mem restis for de la movado dum jaroj, ĉar laboro ne permesis al mi pensi pri afero alia. Sed ŝajne oni bone semis, ĉar jen mi. Ĉu ne, s-ro Besada?

Sed plue pri argumentoj: al homo kiu diras: "sed Esperanto estas fiasko, mortinta lingvo!" mi povus humure respondi ke dum tuta semajno mi kunsidis kun mortintoj kaj fantomoj (Valpurga nokto, ĉu?), kaj aldone demandi ĉu vere mi aspektas mortinto kaj tuj kuri al kuracisto! Vi trovos, ke iom da psikologio, trankvila simpla pensmaniero kaj humuro estas tre efikaj armiloj.

Oni ankaŭ diras: "Baf, Esperanto estas nur bela revo!" Jes, ankaŭ Ruĝa Kruco estis revo, komuna valuto por Eŭropo estis simple nepensebla, promeni sur la Luno estis afero de frenezuloj.

Se oni diras: "Pere de la angla vi facile solvas la problemon", mi rakontus kiamaniere du el niaj samideanoj preskaŭ malsatmortis en Prago provante komprenigi sin per la angla en restoracio...

Tiu simpla kaj ofta propono de la angla verŝajne ne funkcios en la praktiko: iru diri al germano, aŭ al franco, ke la angla estos la nura lingvo uzota en...

Kaj prie, ĉi-jare dek pliaj landoj eniros la Eŭropan Union. Kiom da interpretistoj (tradukistoj) oni bezonos por ili? Prenu en konsideron, ke tiu, kiu ekzemple tradukas el la angla hispanen, ne kutimas fari la malon.

Kiom elspezas jare Unuiĝintaj Nacioj, nur rilate al tradukservoj? Jen bona demando.

Kelkaj naive asertas, ke tre baldaŭ komputiloj kapablos traduki kiun ajn lingvon. Sed kial uzi lambastonon, se oni povas libere marŝi? Kaj kiom da tempo ankoraŭ? La rezultaj tradukoj aspektas plejofte piĝinaj, eĉ veraj kaĉoj.

Se ju demandas, kiom da tempo ni bezonos por konvinki la homaron, ni povus respondi: "espereble malpli ol tiom, kiom oni bezonis por konvinki ĉiujn pri la formo de la Tero" aŭ "ĉu vi jam sukcesis paroligi la anglan al ĉiuj?" Multaj el la argumentoj kontraŭ Esperanto estas simplaj fantomoj, sed ni devas ĝisfunde koni nian aferon por kontraŭargumenti. Multaj homoj timas perdi kulturen identecon, kiam oni uzos Esperanton kiel komunikilon.

Oni pensas: mia lingvo, mia kulturo: tio estas mia memo. Kaj multaj naive timas, ke Esperanto venas anstataŭi la gepatran. Nu, se temas pri homo kiu jam lernis duan

lingvon, vi povas demandi: "Ĉu vi pro tio perdis vian kulturon? Ĉu vi perdis vian lingvon?" kaj profiti la respondon. Se li aŭ ŝi ja spertis tiun perdon, vi klarigos kial lingvo ĉiesa trudas nenion. En vero Esperanto neniam fariĝus edzino, sed kromvirino... Kaj se li aŭ ŝi ne timas tiun perdon, vi oferos la ŝancon ĝui du kulturojn, kion faras multaj homoj en la mondo.

Misinformado plurfoje fontas el simpla, senpensa akcepto de argumento. Multaj homoj estas naive konvinkitaj pri tio, ke nur lingvo nacia, lingvo de potenca lando, fariĝos interkomunikilo tutmonda. Sed la vero estas, ke tiaj proponitaj solvoj, kiuj ligiĝas nur al la ekonomia potenco de lando, ne daŭras. Kio pri la franca, dum la pasinta jarcento? Kio pri la rusa?

Eble post kelkaj jaroj oni ankaŭ sin demandos pri la angla...

Al homo kiu demandas: "Ĉu pere de Esperanto mi akiros pli bonan laborpostenon?" oni ne mensogu: ni klopodu eltrovi, kiuj es-



tas la ĉefaj intereskampoj de tiu homo. Tute certe li ne nur interesiĝas pri mono. Se tiel estas, forgesu lin; ni ne bezonas tian homon!

Iam mi aŭskultis la opinion: "La mondo funkcias sufiĉe bone de jarmiloj sen bezono de internacia lingvo". Kaj mia respondo estis: Jes, kaj pro tio ĝi tiel bone funkcias, pro tio estas tiom da bombado kaj murdatencoj, kaj miskompreno interetna.

Grava problemo estas, ke nia movado estas iom fermita: por ĝin eniri oni bezonas lerni la lingvon. Ni provas disfaliĝi la murojn de miljaroj, sed ekzistas nia mureto.

Ofte ni dediĉas nin nur al niaj kluboj kaj rondoj, sed ni bezonas malfermi nin al la mondo: demandu vin mem, ne nur kion oni povas fari **por** Esperanto, sed ankaŭ **per** Esperanto.

Rezisto kontraŭ lingvo artefarita, do nefleksebla, netaŭga kaj infaneca estas unu el la plej uzataj argumentoj kontraŭ la uzo de Esperanto. Tamen, artefarita estas la mo-


derna hebrea lingvo, kiom mi scias, artefarita estas la literatura franca lingvo, tiu *passé simple* kiun oni ne uzis en ĉiutaga parolado. Kiam oni analizas la malgataĵojn de niaj naciaj lingvoj oni miras pri tio, kiamaniere oni povas taksu ilin "naturaj".


Tamen, la plej bona estas neniam akcepti tiun vorton, ĉiam priskribi Esperanton kiel lingvon **planitan**.

Estu pretaj citi la nomojn de gravuloj, kiuj favoris aŭ favoras la ideon de lingvo internacia. **Sed ne forgesu, ke vi mem povas prestiĝigi la lingvon.** Se vi enketis viajn samklubanojn, vi trovos ke multaj eklernis la lingvon pro influo de homo kiu ne nur estis esperantisto, **sed ankaŭ tre humana, ĉarma, monduma, brila, bonkora...** kiel diris la apostolo Paŭlo: "Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo."

Kaj tio ni ne estas.

Dankon.





Tri konkludoj por sukcesigi Esperanto-kursojn

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

En Kubo kaj en aliaj landoj, unu el la ĉefaj vojoj venigi interesitojn pri Esperanto al la asocio kĉaj movado estas pere de regulaj kursoj kiuj proksimume daŭras kvin monatojn. Plejofte en kunsidoj kaj alispecaj instruistaj renkontiĝoj, oni esprimas, eĉ plendas pro tio, ke pluraj lernantoj forlasas la kurson kaj ke la reteno estas tre malalta.

Kiel plurjara E-instruanto, mi ankaŭ iel-aliel travivis tiun problemon kaj preparolis ĝin kun gekolegoj, sed samtempe klopodis ion fari por renversi ĝin tiel ke pli da lernantoj restu en la kurso, kaj plej grave, ke ili eksentu ion por Esperanto.

Post longa meditado kaj memeksperimentado, mi alvenis al kelkaj konkludoj, kiujn mi volas dividi kun miaj samideanoj kaj kolegoj ĉar mi konsideras, ke ili povos sukcesigi E-kursojn.

La unua, laŭ mi, estas estigi afekcian komunikiĝon inter la instruantoj kaj la lernantoj. Tio signifas, ke la instruanto devos rilatiĝi kun la lernantoj kiel amikoj mallongigante la distancon kiu normale ekzistas inter ili en la klasĉambro.

Antaŭ kaj post la leciono devos esti spaco por konversacii kun la lernantoj pri diversaj temoj: pri ties familioj, laboroj, aspiroj, ktp. Tiu interparolo povos okazi en la lernejo aŭ aliloke.

Sendube la konversacio multe alproksimigas homojn. La E-instruanto devos konscii ke li aŭ ŝi estas la ĉefa motoro por venigi homojn al la movado kaj ĝuste pro tio ne povas agi kvazaŭ malvarma maŝino, kiu nur



interesiĝas pri lingvaj aspektoj kaj punkto fino. Li/ŝi devos trovi ligan, konekton kun la koroj kaj sentoj de la lernantoj.

Se lernanto forestas du sinsekvajn fojojn, li tuj devis kontakti, zorgi pri li aŭ ŝi, kio multe efikas. Kiam persono rimarkas, sentas ke alia(j) persono(j) zorgas pri li/ŝi tuj eksentas ion nerutinan, interesan, engaĝigan, ktp.

Mi mem travivis tion, ĉar iam, kiam mi iomete apartiĝis, iu vokis min kaj zorgis pri miaj problemoj; tiam mi revenis kaj restis ĝis nun aktiva en la movado.

Afekcia komunikigo estas tre grava, des pli en Esperantujo. Esperanto-instruantoj ĉiam konsciuj, ke ili ne instruas al senanimaj objektoj, sed al homoj kiuj havas korojn kaj sentas. Sendube, tiuspeca komunikigo estas ora ŝlosilo por ke niaj kursoj sukcesu.

Dua konkludo estas, ke ĉiu instruanto de la internacia lingvo devas scii ke en la nuntempo oni instruas lingvojn por ke la lernantoj komunikigu pere de ili, por uzi ilin. Por atingi tiun celon, la lernantoj devos fariĝi kompetentaj pere de la lernado de komunikaj funkcioj.

Ni ĉiuj rememoru ke la komunikaj funkcioj estas la intencoj, la kialoj de la komunikado. Homo interkomunikigas ĉar daŭre estiĝas komunikaj bezonoj, informomankoj, kiujn oni devas plenumi.

La lernantoj devas rimarki, ke kiam ĉiu leciono finiĝas ili kompetentas, scipovas fari ion per la lingvo kion antaŭe ili ne scipovis fari.

Ekzemple, intersaluti, demandi pri ies faroto, origino, profesio; priskribi fizikajn kaj moralajn personajn trajtojn, montri ricevanton de ago, paroli pri pasintaj ĉiutagaj agoj kaj pri estontaj planoj, ktp. Tiel ili taksos la lingvolernadon utila.

Oni ne dediĉu multe da tempo al la gramatiko; la gramatiko daŭre postsekvu kaj

subordiĝu al la komunikado de ideoj, opinioj kaj sentoj. Ni ne elformu E-gramatikisistojn, sed E-uzantojn, kiuj parolos kaj skribos la internacian lingvon.

Tria konkludo estas, ke la E-instruanto ne nur devas dediĉi sin al la lingvistikaj aspektoj, sed li/ŝi ankaŭ devas pasie informi al la lernantoj pri la idealoj, historio kaj kulturo de Esperanto, pri la filozofio de la Zamenhofa lingvo.

Se la kurso finiĝas kaj la lernantoj ne konatiĝis kun L. L. Zamenhof, kun ĉefaj aspektoj de la vivo de nia komunumo kaj tiuj de UEA, ktp., ni ne plenumis la celon de la lingvo, ni ne vekis la bezonatan senton de aparteno al la komunumo, la identiĝon kun la idealoj de la lingvo kiuj igas interesitojn esperantistiĝi.

Aldone al tio la instruanto devas ligi la lernantojn kun la interna vivo de la filio, de la asocio, de la internacia komunumo tiel ke ili mem konstatu ke Esperanto estas socia fenomeno, ke ĝi vivas ĉar homoj enlande kaj eksterlande uzas ĝin.

Bona Esperanto-instruanto daŭre fleĝu tiun celon.

Taskigi la lernantaron estas alia maniero ligi ilin kun la vivo de la asocio kaj esperantistigi la plejmulton.

Kiam la instruanto donas ŝancojn al la lernantoj por ke ili laboru, faru ion por la asocio, li engaĝigas ilin al la esperantista agado tiel ke ili ankaŭ ricevu stimulon, estimon, rekonon pro la laboro farita favore al Esperanto.

Mi ja certas ke aliaj E-instruantoj povos aldoni pliajn sugestojn kaj rekomendojn por sukcesigi E-kursojn, sed post plurjara sperto, mi decidis profiti tiun ĉi spacon, kiun la organizantoj de la 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto donis al mi, por dividi miajn konkludojn kun miaj gekolegoj tiel ke ili ankaŭ ĝuu sukceson dum la Esperanto-instruado.

Esperanto: perdita ego en la universo de Fernando Ortiz*

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

Estas titana laboro por ĉiu esploristo aŭ scienculo alproksimiĝi al la verkaro de Fernando Ortiz – prave konsiderata la tria malkovrinto de Kubo, post Cristóbal Colón kaj Alexander von Humboldt –, eĉ nur al parto de lia ampleksa agado.

Oni scias ke “la eminenta kuba multface-ta verkisto (...) estis legitima heredanto de la humanista enciklopedismo el la hispanamerika intelektularo de la 19-a jarcento”;¹ ke li agadis en diversaj branĉoj de la sociaj sciencoj, inter aliaj juro, antropologio, etnografio, folkloro, filologio kaj historio; ke li, krome, “(...) dediĉis siajn energiojn kaj fizikajn kaj intelektajn kapablojn al fondado kaj regado de institucioj kaj informiloj de

kultur-sciencia propagando”,² agnoskita ne nur en Kubo.

Sufiĉas mencii *Contrapunteo cubano del tabaco y el azúcar* [Kuba kontrastigo de l' tabako kaj la sukero], *Historia de una pelea cubana contra los demonios* [Historio de kuba kverelo kontraŭ la demonoj], *Los negros curros* [La kuraĝaj nigruloj], *El engaño de las razas* [La trompo de la rasoj], aŭ *La africanía de la música cubana* [La afrikeco de la kuba muziko], nur kelkaj el liaj ĉefverkoj, celante penetri la intelektan dimension de kiu longe dediĉis sin al funda esplorado de la diversaj elementoj kiuj influis kaj kunfluas en la unuiĝo de nia identeco.



Rilate al filologio kaj speciale al lingvistiko, estas tre famaj liaj leksikografiaj notoj en *Un catauro de cubanismos* [Ujo de kubanismoj], publikigita en 1923, kiun 40 jarojn poste li reprenis kaj, post aldonoj kaj korektoj, li prezentis kiel *Nuevo catauro de cubanismos* [Nova ujo de kubanismoj], fine aperinta en 1994, en postmorta eldono.

Ĉi-kampe, ankaŭ menciendas *Glosario de afronegrismos* [Glosaro de afronegrismoj], kiu aperis en 1924 kun antaŭparolo de Juan M. Dihigo "(...) nia ununura fakulo pri la lingvo kun serioza lingvistika formado dum la pseŭdorepubliko",³ kiu laŭdis d-ron Ortiz pro ties valora laboro.

Al tiuj verkoj, aldonendas multaj artikoloj en ĵurnaloj kaj revuoj, kiuj kune montras la nenegeble favoran signon de Ortiz rilate lingvistikan esplorado. Ekzistas abunda literaturo, aktiva kaj pasiva, kiu montras lian fruktodonan laboron en tiu ĉi kampo; tamen ankoraŭ mankas esplori aliajn ĝis nun ne traserĉitajn eĝojn, ekzemple lian agadon por Esperanto, al kio mi de la lastaj jaroj dediĉas iom da tempo.

Ekde 1990, kiam mi transprenis la respondecon gvidi la laborojn de la Komisiono pri Historio ĉe KEA, samtempe komencis ankaŭ serĉadon kaj kompilon de konitaĵoj pri la esperantista agado en nia lando. Tiam, aperis la unuaj referaĵoj pri la propaganda laboro de Ortiz favore al enkonduko de la Internacia Lingvo en Kubo, komence de la pasinta jarcento.

Poste, mi trovis dokumentojn, faldfoliojn, ktp, kie troviĝas spuroj de la agado de Ortiz ĉi-kampe.

Ekzemple, en la revuo *Latinamerika Esperantista* (sic.), de marto 1916, oni diras: "D-ro Mariano Aramburo, per kelkaj artikoloj en la revuo *El Figaro* – poste kolektitaj en ĉapitro de *Literatura crítica* [Kritika literaturo] – kaj d-ro Fernando Ortiz, pere de aliaj artikoloj aperintaj en la dimanĉaj eldo-

noj de la ĵurnalo *El Mundo*, prezentis Esperanton en Kubo."⁴ (Aldonendas, ke la artikoloj de Ortiz aperis 17 monatojn antaŭ tiuj de Aramburo.)

Tiuj novaĵoj kondukis min al *Bio-bibliografía de Don Fernando Ortiz* [Bio-bibliografio de S-ro Fernando Ortiz], kompilaĵo de d-ino Araceli García-Carranza, verko kiu konfirmas tion kaj donas novajn referaĵojn,⁵ kiuj konsekvence devigis min postiri la serĉadon de tiuj fontoj, ne ĉiam facile atingeblaj; sed, post pena kaj elĉerpiga laboro, mi sukcesis trovi kelkajn el ili, dank' al dediĉita kaj pacienca kunlaboro de helpantinoj el la Kuba Salono de la Nacia Biblioteko José Martí kaj la biblioteko de la Ekonomika Societo de Enlandaj Amikoj.

El ĉio ĝis nun trovita – la esplorado daŭras –, menciendas "El lenguaje universal", artikolo en kvar partoj, aperinta hispanlingve en *El mundo ilustrado*, suplemento de la dimanĉa eldono de *El mundo*, la 4-an, 11-an, 18-an kaj 25-an de marto 1906, en Havano.⁶

Celante prezenti parton de la agado de Ortiz por la propagando de Esperanto en nia lando, mi apogas min sur tiu teksto, kun la bezonataj aldonoj. En la unua parto de tiu artikolo,⁷ inter aliaj argumentoj, Ortiz diras:

Dum longa tempo – dum jarcentoj – estis aspiro de la homaro adopti komunan lingvon por ĉiuj homoj, pere de kiu povus interkomuniki siajn ideojn, parole aŭ skribe, la enloĝantoj de tiu ĉi planedo, sendepende de sia geografia situo, denaska lingvo, raso, lando, religia kredo, ktp. Sammezure laŭ la avanco de la intelekta progreso, tiu tendenco estis pli imperativa; kaj jam en la 18-a jarcento la solvo de la problemo estis juĝita kiel ebla. Bacon, Pascal, Descartes, Leibnitz, Locke, de Bosses, Condillac, Voltaire, Volney, Am-

père, J. Grimm, ktp., opinias pri la vivipoveco de universala lingvo.

(...)

Hodiaŭ, la aspiro konkretiĝas en bela realo. Hodiaŭ ekzistas lingvo rapide kaj konstante disvastiĝinta kun universala karaktero. Tiun ĉi lingvon oni konas de sia aŭtoro kiel Lingvo Internacia kaj ĝenerale sub la poezia nomo Esperanto.

(...)

Hodiaŭ, la nombro de esperantistoj estas konsiderinda kaj ili sukcesis grupiĝi en diversaj esperantistaj centroj en ĉiuj landoj. En Latinameriko ni delonge havas du gravajn centrojn en Santiago de Chile kaj Lima (Peruo) kaj gloras por ni, iberamerikanoj, esti la unuaj parolantoj de la kastilia lingvo kiuj komprenis la gravecon de Esperanto kaj kiuj laboris por ties disvastigo. Tiu merito apartenas speciale al d-ro Federico Villarreal, peruano.

La plej grava el ĉiuj esperantistaj societoj estas la Société pour la Propagation de l'Espéranto (Societo por la Propagando de Esperanto), en Parizo, fondita en 1898, kies notinda kreskado atingas 40 procentojn jare, laŭ la membronombro. Inter ili, troveblas intelektuloj, komercistoj, politikistoj, diplomatoj, negocistoj, ktp, el ĉiuj landoj. Ĝia jarlibro, nomita Tutmonda Jarlibro Esperantista, registras la facilecon lerni la lingvon, atingeblan por ĉiuj inteligenteco.

La esperantista biblioteko jam estas multnombra. Krom la lernolibroj, kiel gramatikoj, vortaroj, ktp., verkitaĵ en pli ol 20 lingvoj, jam estis tradukitaĵ al esperanto verkoj de Homero, Esopo, Shakespeare, Byron, Goethe, Beaumarchais, La Fontaine, Leibnitz, ktp., ĝis pli ol 200 publikaĵoj. Krome, la propaganda fervoro de la esperantistoj estas tiel intensa ke hodiaŭ publikiĝas pli malpli 20 gazetoj en esperanto aŭ favoraj al la lingvo de Zamenhof.

Menciendas i.a. L'Esperantiste (*La Esperantisto*), Parizo; La Belga Sonorilo, Courtrai; La Holanda Pioniro (*sic.*), Hilversum; La Suiza Espero (*sic.*), Ĝenevo; Antaŭen Esperantistoj, Lima; Ĉilio Esperantista, Santiago de Chile; La Suno Hispana, Murcia; La Lumo, Montrealo; Internacia Sciencia Revuo, Parizo, ktp. Kiam videblas la revuo de la kubaj esperantistoj? Aŭ oni legos iam La Kuba Stelo?

Kiel evidentas en tiuj ĉi paragrafoj, Ortiz donas panoramon pri la provoj antaŭaj al Esperanto, celinte krei universalan lingvon, al kio li aldonas rakonton pri la monda agado de tiu lingvo ĝis 1906, kaj metas finon al la unua parto de sia artikolo per du antaŭvidaj demandoj.

Permesu al mi aldoni, ke la atendo de Ortiz ne daŭris tro da tempo: du jarojn kaj ok monatoj poste, en januaro 1909, ekaperis *Kuba Stelo* – pli malpli, same kiel proponite –, tamen ĝi havis mallongan vivon: nur eldoniĝis du numeroj (januaro kaj februaro) kiel oficiala organo de Kuba Esperanta-Societo, fondita en Santiago de Cuba la 18-an de oktobro 1908,⁸ fakto al kio ŝajnas Ortiz dediĉis la raporton “Sociedad esperantista” [Esperantista societo] en la postgameza eldono de *Diario Español*, la 16-an de decembro tiujare, teksto kiun bedaŭrinde ankoraŭ mi ne trovis, sed estas menciita de García-Carranza, en sia *Bio-bibliografía...*,⁹ pri kiu mi jam parolis.

Sed, ni revenu al la artikolo “El lenguaje universal”, kiun krome la aŭtoro decidis subskribi esperantlingve per la pseŭdonimo “D-ro Novemo”, kio evidentigas la malferman sintenon de Ortiz al ĉiu novaĵo, la evoluo kaj la estonteco.

En la dua parto, Ortiz klarigas: “Antaŭ komenci indiki la sennombrajn avantaĝojn de Esperanto, tiel en la tereno de la filologia teorio kiel en la praktiko, mi reproduktas

jene ĉiujn gramatikajn regulojn.”¹⁰ Kaj prezentas, nedubeble, detalan version – absolute klaran kaj didaktikan – kiu inkludas, esence, la tutan gramatikon de Esperanto: ekde la alfabeto kaj proksimumaj sonoj (laŭ ekzemploj ĉefe el la hispana lingvo) ĝis ĉiuj partoj de la frazo (t. e. substantivo, adjektivo, verbo, prepozicio, ktp.) eĉ la akcento, la numeraloj, komparativoj, participoj, kaj la vortfarado (laŭ la gramatikaj finaĵoj, pere de la unuiĝo de radikoj kaj la uzado de prefiksoj kaj sufiksoj). Al tio, li dediĉas la duan kaj trian partojn de la menciita artikolo.¹¹

Sciante ke li estis – kaj estas – antaŭiganto, li prezentas sin ĉi tie kiel konvinkita esperantisto, kapabla antaŭvidi la grandajn lingvistikajn, sociajn kaj kulturajn avantaĝojn, kiujn ĝenerale reprezentus la enkonduko de tiu lingvo en nia lando. Pere de “El lenguaje universal”, li ne nur konfirmas sin kiel antaŭiganton, sed krome kiel la unua propagandisto kaj la unua Kuba E-instruisto, ĉar la teksto estas magistra leciono, didaktike orientita kaj redaktita por la ĝenerala publiko.

Se tio ankoraŭ ne sufiĉus, validas legi fragmentojn de la kvara parto¹² de la artikolo. Ni vidu:

Antaŭ ĉio oni devas noti la mirindan flekseblecon de la lingvo de D-ro Zamenhof kompare kun la aliaj lingvoj. Kiu ajn ideo, ne gravas kiel maldensa kaj subtila ĝi estu, kiu ajn nuanco de la penso, povas esti tradukita pere de Esperanto. Kaj – kiel povas noti kiu ajn E-lernanto – estas pli facile transloki la penson al esperanto, ol traduki paragrafon verkitan en tiu ĉi lingvo al la denaska lingvo, kio ŝajnas nebla je simpla rigardo, se oni forgesas la elementojn enhavatajn de esperanto, ĝia ekstrema kombinebleco kaj la matematika ekzakteco, tiel dirite, pere de kiu la radikoj, afiksoj kaj eroj interrilatiĝas; tiom ke ne troigante oni povas diri, ke espe-

ranto estas vera filologia filozofio aŭ filozofia filologio.

(...)

La plej granda parto el la esperantistoj lernas la novan lingvon sen instruista helpo; tamen en multaj urboj oni instruas specialajn kursojn en la esperantistaj centroj organizitaj tiucele. Fine, esperanto havas la grandan avantaĝon ke ĝi povas esti komprenata tuj, nur helpe de vortaro, kio nek okazas, nek okazis iam ĉe iu alia lingvo.

Oni devas esperi ke ankaŭ en Kubo oni enkonduku kaj etendigu la konon kaj uzon de la lingvo de Zamenhof – kiel en la ceteraj kleraj landoj – kaj ke baldaŭ ni povos ĝui Kuban Societon por la Propagando de Esperanto [sic.] kaj ian revuon La Kuba Stelo [sic.].

Tiel konkludas Ortiz sian unuan Esperanto-vojaĝon pere de publikaĵoj – laŭ nia scio ĝis hodiaŭ –, kaj tiel preskaŭ finiĝas tiu ĉi teksto, sed mankas kelkaj elementoj por komplementi tiujn ĉi konsiderojn. Inter ili, mi mencias tri:

1. La 1-an de januaro 1910, naskiĝis en Havano, Societo Kuba por Propagando de Esperanto, same kiel proponis Ortiz, kiu membris en ĝia Estraro, kune kun Mariano Aramburo, Juan M. Dihigo, Julio Jover Anido, Mateo I. Fiol, José M. Espín kaj Antonio Alemán Ruiz.¹³
2. Laŭ la revuo *Cuba Esperantista* en januaro 1912: “La unua inklino kompili konitaĵojn pri Esperanto en Kubo aperis pro letero de d-ro Fernando Ortiz al la direktoro de *Cuba Esperantista*, kie li petis ĉiutipajn sciindaĵojn por la *Revista Bimestre Cubana*, kiun gvidas d-ro Ortiz.”¹⁴

3. Kelkaj personoj, dum jardekoj, kompilis informojn kaj intencis verknian E-historion; sed estis bezonate atendi 82 jarojn por ke, almenaŭ modeste, la Kuba E-movado havu la unuan skizon de tiu historio, kiu estis reproduktita de la nuntempa Kuba Esperanto-Asocio, en 1994, teksto rapide elĉerpita, same kiel ĝia dua eldono (korektita kaj ampleksigita), en marto 1996.

Estas aspiro de ĝia aŭtoro (ankaŭ aŭtoro de tiu ĉi teksto) ke baldaŭ ni povu havi pli kompletan kaj riĉan version kun aldonajoj, precizigoj, fotoj kaj aneksoj. Do, 86 jarojn post tiu gravega peto, eblas proponi tiun *Historion de la E-movado en Kubo* – Esperante aŭ hispanlingve – al la nuntempa *Revista Bimestre Cubana*, por plenumi la deziron de Fernando Ortiz.

Notoj

* Prelego hispanlingve prezentita de la aŭtoro sub la nomo "Dankon, Fernando Ortiz", dum la simpozio Fernando Ortiz kaj Esperanto, la 10-an de decembro 1997, en la sidejo de la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj, en Havano.

¹ Carlos del Toro: *Fernando Ortiz y la Hispanoamericana de Cultura*, p. [13].

² Ibid.

³ Sergio Valdés Bernal, en: "Prólogo" a *Glosario de afronegrismos*. 2-a eldono, p. XV. P. 7.

⁵ Araceli García-Carranza: *Bio-bibliografía de Don Fernando Ortiz*, pp. 60 kaj 132.

⁶ Pp. 113-114, 122, 134 kaj 147.

⁷ 4-an de marto 1906, pp. 113-114.

⁸ Raúl Juárez Sedeño: *Kronologio de la E-movado en Kubo*, p. 1.

⁹ García-Carranza: *Bio-bibliografía...* p. 132.

¹⁰ 11-an de marto, p. 122.

¹¹ 11-an kaj 18-an de marto, pp. 122 kaj 134.

¹² 25-an de marto, p. 147.

¹³ Sociedad Cubana para la Propagación del Esperanto: *Esperanto*, pp. (3) kaj 19.

¹⁴ Pp. 3-4.

Bibliografio

GARCÍA-CARRANZA, ARACELY: *Bio-bibliografía de Don Fernando Ortiz*. Instituto Cubano del Libro, La Habana 1970.

Sociedad Cubana para la Propagación del E-o: *Esperanto*. Havano, 1912.

—————: "Los precursores", en *Latina-merika Esperantisto*, jaro 1, n-ro 1, marto 1916. Havano, pp. 6-7.

—————: "Sobre Historia", en: *Cuba Esperantista*, jaro III, n-ro 1, Havano, januaro 1912, pp. 3-4.

JUÁREZ SEDEÑO, RAÚL: *Kronologio de la E-movado en Kubo* (broŝuro ne publikigita.)

NOVEMO, D-RO: "El lenguaje universal (apuntes de vulgarización)", en: *El mundo ilustrado*, 4 de marzo, pp. 113-114; 11 de marzo, p. 122; 18 de marzo, p. 134; 25 de marzo, p. 147, La Habana, 1906.

ORTIZ, FERNANDO: *Glosario de afronegrismos*. 2da ed. Prólogo de Sergio Valdés Bernal. Editorial de Ciencias Sociales, La Habana, 1990.

—————: *Nuevo Catauro de Cubanismos*. Editorial de Ciencias Sociales, La Habana, 1974.

RODRÍGUEZ GÓMEZ, JUAN RAMÓN: *La Esperanto-movado en Kubo*. 2-a eldono. Kuba Esperanto-Asocio, Havano, 1996.

TORO GONZÁLEZ, CARLOS DEL: *Fernando Ortiz y la Hispanoamericana de Cultura*. Fundación Fernando Ortiz, La Habana, 1996.

Kia Esperanto-movado por Ameriko?

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Enkonduko

Preskaŭ 117 jarojn post la naskiĝo, la Zamenhofa lingvo trovas sin trairinta la vojon por kiuj aliaj lingvoj bezonis jarmilon. El broŝureto aperinta en 1887 kreskis plurdek-milaj bibliotekoj en 1987. De unu parolanto iam, ni iĝis miliona popolo nun. Popolo kiu klopodas trovi sian lokon en la avangardo de la moderna komunika ordo.


Hodiaŭ ni staras ĉi tie por paroli pri la estonteco de Esperanto en nia regiono. Temas pri la 6-a kontinenta renkontiĝo, ĉiam oportuna tribuno por pripensi nian estontecon kiel regiona komunumo kiu apartenas al tutgloba movado. Estas ankaŭ jubilea jaro de Esperanto en Kubo, centjariĝo de Esperanto kaj 25-jariĝo de nia landa asocio, do la lingvo jubileas. Kaj ni ne intencas ĉi tie plu paroli pri la interna ideo de Esperanto, tamen, ni povas eĉ diri, kiel aliaj antaŭuloj

tion faris, ke eĉ se ĝi – la interna ideo – ne ekzistis, kreiĝis ĝi tra la pasintaj cent jaroj. Ĝi nomiĝas internaciismo.

Detaloj pri la temo

En 1994, dum la 79-a UK de Esperanto en Seŭlo estis kreita la Amerika Komisiono por prizorgi la agadon por la internacia lingvo en Ameriko. Ĉefa celo: plivastigi la kunlaboron inter landaj movadoj de la kontinento kaj ankaŭ direkti la atenton al konservado de interesiĝo pri Esperanto flanke de grupoj kaj izoluloj en landoj sen organizita strukturo aŭ malforta movado.

Ĝuste dek jarojn post kreado de la Amerika Komisiono oni povus kelkminute pensi kiom multe sukcesis tiu projekto. Mem-evidentas ke la ekesto de tiuj ĉi kongresoj obeas al konkreta rezulto de teama agado, kiu meze de malfacilaj cirkonstancoj



provadis konkretigi planojn. Sendube la gvidado de Atilio Orellanas, la unua komisionestro, konsistigis efikan movilon por efektiviigi plurajn taskojn kaj projektojn, ekzemple:

1. Partoprenigo de latinamerikaj esperantistoj en UK-oj kiel volontaj aktivuloj;
2. Okazigo de Amerikaj Kunsidoj kadre de sinsekvaj UK-oj per kio oni ebligis al amerikanoj havi ĉiujaran forumon por pritrakti la agadon en la regiono;
3. Okazigi fermitajn kunsidojn de la komisionanoj por plani la estontan laboron; kio en la lasta UK ne okazis;
4. Daŭre aktivigi kaj varbi monkontribuantojn por la Fondaĵo Ameriko, per kio oni sukcesis konkretigi laborplanojn por la regiono; tiu tasko restas sub gvido de A. Orellanas;
5. Ekfunkciigo de la Amerika Oficejo en Brazilo. La Amerika Oficejo malgraŭ pluraj malfacilaĵoj restas viva kaj aktiva danke al sindonemo de brazilaj esperantistoj. Tamen, ĝia rolo restas ankoraŭ tre limigita.

Jen resume, ĝenerala laborrezulto de la Amerika Komisiono, kio sendube konsistigas fundamentan kontribuon al la tutmonda movado. Tamen, multo restas nefarita. Kelkaj faktoroj influas kaj influos nian agadon: Ameriko estas kontinento kun tre apartaj trajtoj:

- Ne ekzistas vera lingvoproblemo en nia vasta regiono.
- Ne ekzistas grandaj kulturaj diferencoj.
- La teritorio estas tre vasta.
- Analfabeteco estas sufiĉe alta en grandaj popolamasoj.
- Ekonomiaj problemoj malhelpas aliron al novaj teknologioj kaj vojaĝado, kontraŭe al la Nordo.

Kontinento enhavanta tiom da kontrastoj malfacile povas trovi ekvilibron kapablan avancigi movadon tiel diasporan, heteroge-

nan kaj amatorecan. Kion devas ni fari por ke nia Amerika movado celkonscie ekaŝu daŭre en la bonan direkton? Jen demando malfacile respondebla.

Neniu havas la veron absolutan, tamen ni, la gvidantaro, ja konscias pri la problemoj kaj havas – principe – la strukturon kernan por entrepreni planojn surbaze de realaj eblecoj. La Amerika Komisiono devos esti la movilo, kiu puŝu antaŭen nian ĉaron, la Esperanto-ĉaro al kiu ni ĉiuj devas alporti sableron. Kiajn esperantistojn ni bezonas? Kion ni kiel komunumo nepre ne povas malflegi?

Kunlaboremo, solidaremo, memlernemo. Motivoj por resti en la movado, valoraj spertoj:

Amikeco: kutime Esperanto-interparolanto interesiĝas pri la homo kaj ties kulturo kaj vivo. Amikiĝo kaj pordmalfermo estas pli kutima praktiko inter esperantistoj.

Kreemo: Pro amo al la lingvo la esperantistoj emas senti sin pli liberaj krei kaj serĉi novajn esprimojn, kio estas faciligata de la lingvaj trajtoj, kio ne okazas en aliaj fremdaj lingvoj.

Profesiiĝo: Jen kelkaj elementoj kiuj nutros nin. Oni devas abandoni retorikon kaj enprofundiĝi en la praktikon. Nu, kiaj homoj povas kaj pretas tion fari?

Nur homoj spirite junaj, kunlaboremaj, solidaremaj, iniciatemaj. La movado bezonas efektivan praktikon de interkompreniĝo.

Ni esperantistoj scias ke la lingvo funkcias, ke tio kion ni faras estas komunikiĝi.

Se ni praktike aplikas la interkompreniĝon dum multaj aliaj personoj nur parolas pri ĝi abstrakte, aŭ trovas malegalecajn kaj multekostajn solvojn al la problemoj, nur tiam ni faras veran kontribuon al la movada plifortiĝo.

Sed karaj gesamideanoj, la tempo laboras por ni. La mondo fariĝas pli malgranda. La bezono de internacia komunikado

kreskas dum niaj ekonomioj pli kaj pli interplektiĝas, niaj komunikretoj internaciigigas kaj ni klopodas regi kaj solvi niajn internaciajn problemojn. Ni devas plu agi por konsciigi la mondon pri la lingva problemo. Ju pli alta la konscio pri homaj rajtoj rilate al la lingvo, des pli granda la ŝanco por Esperanto. Sed ni pensu, ke per ia procedo de socia determinismo la homoj aŭtomate venos al Esperanto. La spertoj de la pasinta jarcento tion instruas al ni. Ĉiu pozitiva eltrovo de la tekniko havas siajn paralelajn negativajn konsekvencojn, ĉiu paŝo al egaleco ŝajne havas sian ekzemplon de malguala traktado.

Ne, karaj geamikoj: necesas laboro. Tro facile ni lasas nin luliĝi de la komforto de nia esperantista vivo kun ties rondo de konatoj; tro facile ni ĝuas niajn interretajn virtualajn projektojn, niajn kongresojn kaj renkontas amikojn realajn aŭ virtualajn.

Necesas redifino de tiuj rilatoj. Necesas memori, ke lokaj kluboj estas unuavice kovejoj de ideoj, preparejoj, ke kongresoj estas lokoj kie ni planas, strategias, trovas komunan direkton. Nia loko de aktiveco estas unuavice fronte al la publiko, en la instruado, la informado, la argumentado por Esperanto. Ni estas esperantistoj por krei esperantistojn, por konvinkadi, por persvadi, kaj nur tiam, por ĝui la lingvon.

Ni estas ankaŭ portantoj de la lingva konscienco de nia generacio. Ni estas ĉi tie ĉar ni studis, kaj iamaniere ni konsideris tiun socian problemon multe pli ol aliaj. Ni per nia praktiko de Esperanto komprenas la internacian lingvan komunikadon kaj ĝiajn implicojn pli bone ol multaj aliaj. Tio siavice signifas, ke ni havas respondecon antaŭ la mondo disvastigi la ideojn, kiuj tra unu jarcento evoluigis la Esperanto-movadon. Esperanto ne estu la sekreta lingvo de malgranda grupo de entuziasmuloj: ĝi estu la lingvo de la amasoj, la lingvo de ordinaraj

homoj, kiuj deziras senpere komunikiĝi, kaj la lingvo de iliaj reprezentantoj, kiuj kune celas, aŭ devus celi, krei pli bonan, pli pacan, pli egalecan mondon.

En nia regiono, same kiel tutglobe, ekzemple, la ĝenerale nekontentiga situacio de la esperantologio ŝuldiĝas ne nur al la esperantologio mem, sed unuavice al la manko de lingvopolitika kompreno en la komunumo. Ne ekzistas sistema traktado rilate tiun punkton, regas hobiaĉo, manko de konscio pri prioritataj taskoj, manko de materia bazo, ktp.

La konsisto kaj internaj procezoj de la lingva komunumo speguliĝas en la lingvo mem – per stilo, eliteca “lingvoevoluiĝo”, i.a. – kaj helpas aŭ malhelpas la aplikon kaj evoluon de la lingvo. Pro tio necesas i.a. pli da sociologiaj esploroj pri la konsisto de la movado, la motivoj por esperantistiĝo, la celo kaj kondutmanieroj de la anoj. Ili necesas por tiri pli realajn konkludojn, kiel gvidi la komunumon konforme al la celoj, kiel varbi novajn adeptojn, vekti latentajn potencojn aŭ sufoki nedeziratajn fenomenojn.

Necesas ankaŭ rekonsideri kelkajn strukturajn problemojn de la komunumo, i.a. la sistemojn de eldonado, edukado, la scienca kaj faka aplikado kaj la internaciaj aranĝoj, inkluzive de la UK-oj, la kapablon de UEA vere roli kiel tutmonda asocio kies eŭrocentrismo estas temo de polemikaj debatoj laŭlonge de ĝia historio. Kiel la regionaj kongresoj povas efike konsistigi forumojn, diskutejojn por planado realisma kaj celtrafa laŭ la kontinentaj trajtoj kaj cirkonstancoj?

Niaopinie, landaj asocioj kaj unuopaj esperantistoj devas konsciigi pri tio ke ili estas la pilieroj de nia movado ĉie tra la mondo. Ni utiligu niajn kongresojn por alpreni decidojn konkretajn kaj forgesi pri fina venko kaj aliaj projektoj elitaj, ambiciaj kaj mankaj je reala bazo. Ni pensu pri la grandaj plimul-

toj, kion ni povas oferi, kion ni kapablas mem doni kaj sinoferi? Sed movado ne estas nur kongresoj, movado estas komunumo, kiu postkongrese kaj konsekvence, puŝas antaŭen sian idearon kaj decidojn per konkretaj planoj kaj projektoj realigeblaj, adapteblaj kaj kongruaj kun la bezonoj de homgrupo. Bedaŭrinde la rilato de la neesperantisma mondo al Esperanto kaj ĝia lingva komunumo ofte estas stampita de antaŭjuĝoj, kiu troviĝas ne nur ekster la komunumo, sed ankaŭ en la komunumo mem. Dum la komunumo lasu sin mistifiki de plej diversaj antaŭjuĝoj kaj ne sukcesu transsalti tian barojn, la movado ne povos vere evolui kaj maturiĝi. Parton de ambaŭ faktoraj grupoj oni povas pozitive influi, aparte per serioza laboro kaj certe ne per timema bojkotado de naciaj lingvoj, aŭ ŝanĝoj de la lingvonomo Esperanto aŭ aliaj paŝoj. La Manifesto de Prago kaj la Strategia Laborplano de UEA estas kernaj dokumentoj por plua progresigo de la movado. Sed bezonatas kuraĝemo, veraj agantoj celkonsciaj pri la lingvoproblemo kaj pri la realaj kondiĉoj de la komunumo kaj de la celgrupoj el kiuj fontas la estontaj membroj.

Tiuj ĉi konstatoj kaj rekomendoj kompreneble ne formas kompletan liston de la nun-

tempa situacio. Precipe mankas, el la vidpunkto de aktivulo, konsideroj pri la organizaj bezonoj de la movado, kiuj ja ne nur estas lingvo-komunumo sed ankaŭ homgrupo kun la celo penetri kaj ŝanĝi la eksteran socion.

Konkludaj ideoj

En la kunvivado kaj funkciigo de la movado plej gravas:

1. Sento de aparteno kaj signifo de la movadanoj. Tio ĉi estas tre malfacile realigebla en internaciaj organizaĵoj. Ekde la unuaj lecionoj ni devas labori por edukado de la novaj membroj, pri nia movado, historio, kulturo kaj aliaj elementoj kiuj iom post iom konsciigas ilin ke temas pri komunumo, movado, familio.
2. Aliro al novaj teknologioj de komunikado: La informa teknologio (Interreto) prezentas novajn eblecojn por interkontinenta, regiona kaj enlanda kunlaboro, sed ankoraŭ mankas la celkonscio, kiu faros **efikan kunlaboron ĉefprioritato** de nia interkompreniĝa movado. Krome, la alirebleco al tiuj ĉi rimedoj estas ege limigita en nia regiono malriĉiĝinta kaj superŝutita de sociaj problemoj. Ĉefe bonhavuloj, profesiaj kaj



homoj kun apartaj funkcioj povas ĝui plene tiun ĉi privilegion. Do, ni ne povas bazi niajn projektojn por informado, edukado kaj disvastigo de Esperanto, prioritare, sur la bontrovo de la novaj komunikaj teknologioj.

3. Estas relative facile transpreni la eksteran-sociajn sciojn en Esperanto per seminarioj, kursoj perkorespondaj, interretaj, klasoĉambraj, fakaj libroj: sed, estas multe malpli facile, tamen, pli grave, transdoni al novaj membroj de la komunumo la akumulitajn spertojn de pli ol cent jaroj. Kaj aparte al aktivuloj. Ili bezonas edukon ne nur kultur-historian, sed ankaŭ pri la teknikoj kaj filozofioj de organizado, pri kio ekzistas malmulta literaturo kaj tre limigita instruado ene de la movado.
4. La estonteco de nia movado dependas ne nur de la kresko en ĝia membraro, kiun eblas konfide antaŭvidi eĉ se ne relative rapide. Ĝi dependas en sama aŭ plia grado de evoluo en la naturo

de la movado mem. Ni devas forgesi pri grupoj de duonnaivaj propagandistoj katenitaj al la vizio de "fina venko"; profesiigo en nia pormovada laboro pli kaj pli altrudiĝas kiel sekvena vojlinio; ni trairu la duan jarcenton pretaj por la malfacila, flugildona procezo de maturiĝo. Tio signifos paradokse, plian ligiĝon kun la ekstera socio kaj plian sendependiĝon disde la tradicioj kaj antaŭjuĝoj de tiu socio, ĉar antaŭjuĝoj en movado kiel la nia, certe estos malutilaj.

Karaj geamikoj, ni venis ĉi tien por kunsidi, festi, ĝui, sed ankaŭ por strategii, por plani, por omaĝi. Same kiel tiu eta verko de Zamenhof eliris la presejon kaj faris revolucion, ni plu trairu la duan jarcenton de Esperanto pretaj por saĝe, racie, mature kaj konscie disvastigi la lingvon de d-ro Zamenhof, sed konvinke kaj per trafaj argumentoj ni tion alstrebu, ĉar Esperanto, kiu same kiel Zamenhof kuracis okulojn, kuracos la spiritojn de la homa socio. Ni fariĝu dignaj flegistoj por tiom nobla celo.





Kongresa Rezolucio

6-a Tutamerika
Kongreso de Esperanto
Internacia Gazetara Centro
Havano, Kubo
21-a ĝis 27-a de marto 2004

Ni, esperantistoj el ses amerikaj landoj (Kanado, Usono, Meksiko, Kostariko, Brazilo kaj Kubo), analizinte la nuntempan situacion de la Amerika Movado kaj pridiskutinte ideojn por ĝia progresigo

Konstatas

- ke nur ĉeestis la kongreson du membroj de la Amerika Komisiono kaj pro tio oni ne sukcesis okazigi kunsidon de la Komisiono;
- ke ne estis prezentitaj projektoj nek raportoj fare de la Komisiono;
- ke neniu el la ĉeestantaj landoj konas – kaze ke tiaj ekzistas – regulojn kaj statuton por la Amerika Komisiono;
- ke ni bezonas difini respondecojn kaj labormetodojn por tiu ĉi komisiono, same kiel pri la uzo de la rimedoj de la Fondajo Ameriko;
- ke mankas nuntempe integrita kunordigado de la kontinenta laboro; kaj
- ke la neoficiala kandidata lando por okazigi la 7-an TAKE en Sudameriko, Ĉilio, nek sendis reprezentanton por transpreni tiun respondecon nek klarigis pri sia malĉeesto, kaj ke Kanado – ĉeestanta lando – proponis sin por alpreni tiun taskon.

Ni rekomendas

- ke la Estraro de UEA devontigu siajn komisiestrojn, se ne ĉeesti, reprezentiĝi almenaŭ per raporto en la koncernaj kongresoj;
- la redaktadon de regularo de la Komisiono kiu devas nepre inkluzivi difinojn pri esencaj aspektoj de ĝia laboro, interalie:
 - a) respondecoj kaj labormetodoj de la komisionanoj kaj komisiestro
 - b) uzo de la rimedoj de Fondajo Ameriko
 - c) rolo de la Amerika Oficejo;
- ke la komisiestro kaj komisionanoj informu unu la alian regule pri sia agado;
- ke oni konsideru kaj pristudu la eblecon krei tutkontinentan gazeton kulturan kaj socimovadan;
- ke la Komisiono laboru cele al la plenumado de la laborplano 2001-2010 aprobita en Meksiko dum la 5-a TAKE;
- ke oni kreu la bezonatajn kondiĉojn por okazigi la 7-an TAKE en Calgary (Kanado) en majo 2007, laŭ decido de la ĉeestantaj amerikaj landoj, kaj subtenata de Kanada Esperanto-Asocio; kaj
- ke oni konsideru la eblecon efektiviĝi la 8-an TAKE en Ĉilio, en la jaro 2010.




Kia Esperanto-movado por Ameriko?

21-a ĝis 27-a de marto 2004

Internacia Gazetara Centro

Havano, Kubo



AVANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo

Telefonoj; +53(7)40 4484; 53 9102 Fakso: 643 8729

avanco@esperanto.co.cu